

Lux ecce surgit aurea*

Brevier-Himno

Ordinara tempo > 1-a kaj 3-a semajno > jaŭdo > matena laŭdo

*Lux ecce surgit aurea: *
piget, pudescit, paenitet,
nec teste quisquam lumine
peccare constanter potest.*

*Tandem facessat cæcitas,
quæ nosmet in præceps diu
lapsos sinistris gressibus
errore traxit devio.*

*Hæc lux serenum conferat
purosque nos præstet sibi;
nihil loquamur subdolum,
volvamus obscurum nihil.*

*Sic tota decurrat dies,
ne lingua mendax, ne manus
oculive peccent lubrici,
ne noxa corpus inquinet.*

*Speculator astat desuper,
qui nos diebus omnibus
actusque nostros prospicit
a luce prima in vesperum.*

*Deo Patri sit gloria
eiusque soli Filio
cum Spiritu Paraclito,
in sempiterna sæcula.*

Amen.

latina T: Prudentius, ĉ. 400;
5-a strofo el Aurora iam spargit polum,
7-a/8-a jarcento

* ankaŭ konata kiel:

Sol ecce surgit igneus

Abismoranden portis nin
pro nia petolema mor'
la nigra nokt'. Forigis ĝin
la tag' per nova lum' el or'.

Ĉi tiu lum' penetru nin
serene ĝis la kor-profund',
kaj nia strebo pruvu sin
en klaro, puro kaj fekund'.

Malbono ĉia restu for
de lang', okulo, buŝ' kaj man'.
Nin gvidu el mallum' al glori'
la nova tag' laŭ Dia plan'.

Okul' de supre vidas nin
kaj gardas super nia ag',
favoras nin kun kor-inklin'
de frue ĝis la fin' de l' tag'.

La tag' de nia vivo-fin'
– dezir', espero kaj plenum'! –
laŭdantaj, viglaj trovu nin,
kaj super-ŝutu nin per lum'.

Nun estu laŭdo, danko, glori'
al Vi, ho Patro, Vi, ho Fil';
honor' eterne kaj ador'
al Vi, Spirito, kun jubil'.

Amen.

E: Albrecht Kronenberger 2003